
# Konciza jarraporto IEspA 2024

*raportas: Marc Vanden Bempt*

La jaro 2024 por la Internacia Esperanto-Arkivo precipe temis pri la aĉeto kaj enordigado de propra arkivejo en Diest, Belgio.



Aperis pluraj gazetartikoloj kaj radiointervjuo, interalie rilate al tiu nova arkivejo.

Ni tamen ne neglektis la pluan enordigadon kaj katalogadon de la kolekto, precipe en la unua duono de la jaro.

La oficialaj statutoj estas modifitaj por akcepti la novan mallongigon "IEspA" kaj por aldoni la eblecon pri investado en nemoveblaĵoj por subteni la bazan celon de arkivado.

Fine de 2024 la kolekto konsistis el

- 8.171 plenaj revujaroj (de 990 revutitoloj) + (almenaŭ) 5.195 neplenaj revujaroj (de entute 1.508 revutitoloj).
  Miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrite):
  minimume po unu (sed ofte pliaj) numero(j) el 5.747 revujaroj,
  aldone 1.007 bindaĵoj de po unu aŭ pluraj (duoblaj) revujaroj
- 15.602 libroj kaj broŝuroj + 13.827 duoblaĵoj (de 5.947 malsamaj titoloj).
  Ni do ne nur atingis la psikologian sojlon de 15.000 libroj (en la 12-a de aprilo) sed jam multe superis ĝin.
- kelkdek bretmetroj nekatalogitaj de dokumentoj (jes ordigitaj laŭ dosieroj): tio estos laboro por 2025 kaj poste. Jam estas dokumentitaj 6.205 eroj en 281 dosieroj.
  Duoblaĵoj: 2.445 dokument-ekzempleroj (de 1.215 malsamaj dokumentoj).
- Objektoj: 5 filmoj deponitaj ĉe Cinematek (cinematek.be) + kelkaj m³ da objektoj poste katalogotaj.

En 2024 volontulino Marie-Louise Vanherk sukcesis relokigi ĉiujn revuojn al senacidaj skatoloj kaj dokumentujoj anstataŭ la antaŭaj. Samtempe ni jam parte forigis plastaĵojn kaj vinktojn.

Kontribuis al la IEspA-kolekto Herman Deceuninck (Halle), Marc Cuffez (Oostende), Doj Hirokaz (Jokohama), Marion (Centre Culturel Espéranto de Toulouse), IKEF, Bert Boon (Munkzwalm), Bernard-Régis Larue (Bruselo), José Antonio Vergara (Ĉilio), Miguel Bento (Brazilo), Néia Lúcia Souza (Brazilo), Marie-Louise Vanherk, Griet Symoens, Aleida Hamel (Nederlando), Flory Witdoeckt (Oostende,

Ilse Jacques (Antverpeno), Pavel Polnický (Ĉeĥio), Rosemarijn De Cleene, Paul Peeraerts (Antverpeno).
IEspA, apud sia propra kolekto, ankaŭ daŭre administras la rekreitan bibliotekon de Flandra Esperanto-Ligo. Katalogoj: sekvu la ligon "Biblioteko" maldekstre en esperanto.be/fel.

IEspA proponas librojn kaj revuojn por vendo kaj interŝanĝo. Tiun eblecon ŝajne precipe interesas al alikontinentaj esperantistoj, kiuj plurfoje mendis erojn.

La kolekto estas ankaŭ plurfoje uzata de esplorantoj.

La rilatoj kun Archiefpunt kaj pri nemateria heredaĵo estas pliprofundigitaj. Aperis en immaterieelerfgoed.be, laŭ propono de IEspA, "Esperanto spreken" (= paroli Esperanton) kiel kandidato por nemateria heredaĵo en Flandrio.

En 2024 ni dissendis la unuajn du eldonojn de nia dulingva (Esperanto, nederlanda) reta novaĵletero.

Ni ĉi-jare aktive kunlaboris en la Manlibro por katalogado de libroj de Ana Manero, kiun ŝi intertempe publikigis.

Ni esperas en la sekvaj jaroj trovi pliajn mecenatojn por repagi la transigan prunton (100.000€) de la Flandra Esperanto-Ligo.

Varbu ankaŭ vi subtenantojn por IEspA:

*Amiko – Briko – Mecenato – Investanto – Volontulo - Aĉetanto*

Detalajn informojn kaj anoncilon vi trovos en la retejo

*iespa.eu*